

The
NORTH AMERICAN
ESPERANTO REVIEW



In this issue:

★ ★

Joseph Leahy by WILLIAM BAFF

Kalocsay kaj Baghy . . de MARJORIE BOULTON

★ ★

NORDAMERIKA ESPERANTO-REVUO

Septembro - Oktobro • 1959

The North American Esperanto Review
(*Nordamerika Esperanto-Revuo*)

2116 North 35th St., Seattle 3, Wash.,
U. S. A.

Vol. 7, No. 5. Sept.-Oct., 1959

Editor: F. R. Carlson

Published bi-monthly by the ESPERANTO LEAGUE FOR NORTH AMERICA, INC., as its official organ. Subscription free to members. Subscription for non-members: \$1.75 per year. Other rates: Bulk orders (must be placed in advance) to members of Esperanto League for North America: 10 copies, 50 cents; gift subscriptions for schools, libraries, eminent persons, etc., and for Esperantists living in countries outside of North America, may be purchased by members for 50c per year, 3 for \$1. The *Review* reserves the right to refuse gift subscriptions for persons who should pay the higher rate.

THE ESPERANTO LEAGUE FOR NORTH AMERICA, INC., is a non-profit organization to encourage the use of the International Language, Esperanto. *Secretary:* Conrad Fisher, 808 Stewart St., Meadville, Pa. *Treasurer:* Adrian Hughes, 476 So. Bailey Ave., Hillsboro, Oregon.

Membership Dues: Regular Members, \$3.; Supporting Member, \$5.; Patron, \$10; Life Member, \$50; Man and wife, each having privileges of Regular Member, but receiving only one copy of publications, etc., \$4.00.

Make all checks and money orders payable to "Esperanto League for North America, Inc."

SPECIALA ZAMENHOFA NUMERO

La decembra *Revuo* estu tute pri nia Majstro! Sendu plejble baldaŭ, anglaŭlingve aŭ Esperante, materialon por tia numero.

REVIEW DEADLINE — Material for the Special Zamenhof Number should reach the *Review* not later than Nov. 15, so that we can get the magazine out by Dec. 1, to reach you before Zamenhof Day.

The *Review* not only permits, but invites, reprinting of material from its pages, except where special notice, such as notice of copyright, appears.

La Revuo ne nur permesas, sed invitas, represon, escepte kie aperas speciala noto limiga pri kopiado.

CONTENTS (English)	Page
Lord Dowdling on a Common Language	8
Esperanto in North America	9
ELNA's Traveling Exhibit	11
The Esperanto Study Group	13
Congress Publicity en St. Louis	16
Esperantists I Have Known	18
Officers of ELNA	19
Local Addresses*	20
Complete Grammar and Pronunciation of Esperanto	Inside Back Cover


ENHAVO (Esperanta)	Paĝo
Mi Iris Pilgrime (Marjorie Boulton)	2
Ŝaci	6
Lernu per Ludo	7
Plu pri Strangaj Lingvoj	10
Internacia Ligo de Esp. Instruistoj	13
Bonvolu Skribi	14
45a Universala Kongreso de Esperanto	15
Freĝjo kaj la Homoj de Marso	17
Enigmo	17
Konu Viajn Gesamideanojn	19

*Add to Local Addresses (page 20):

Kvakera Esperantista Societo,
c/o Donald Broadribb, Collins, New York

PARDON IT, PLEASE

Page 18, line 20, read "months", instead of "years".



To the Great Kum Kwat,
Lord High Mukamuk,
Solar System Exploration Service,
United Nations of Venus.

Dispatch 070959

President (or Mr.) Eisenhower, leader of one of the greatest Terran nations, is engaged in a round of visits to leaders of other nations.

On August 31, 1959, Terran calendar (310859 our calendar), P. Eisenhower and P. M. MacMillan, leader of another great nation, appeared and spoke on television (a previously described primitive communication system—see dispatch 200150). I quote from the remarks of P. Eisenhower:

“ . . . the world needs a better exchange of ideas, products, trade and the conclusions of scientists—but, above all, of people.”

“ . . . necessity for broadening our contacts in the world—particularly with the Iron Curtain countries.” (a reference to some nations in disagreement with those friendly to P. Eisenhower. See dispatch 120854.)

This, Your Royal Mukiness, seems to indicate an approach to a civilized viewpoint. But on this same trip P. Eisenhower seems to have caused consternation to the Masters of Protocol in another of the great nations which he visited. The official automobile (a primitive transportation device described in dispatch 070250) intended to transport him and the visited leader, C. Adenauer, did not have room for the two of them and an interpreter (a device for explaining to each of them what the other says). It seems that even the leaders of the great nations cannot understand one another without use of an interpreter.

I suggest that we delay any official contact with this irrational race while we explore the possibility of interesting them in the use of a neutral international language, like our Esperanto.

To Tem, Loman in charge,
Terra Exploration Saucer.

Mi Iris Pilgrime

PER KIA MEZURILO oni povus mezuri la ŝuldon de la Esperanto-Movado al Julio Baghy kaj Kolomano Kalocsay? Julio Baghy instruis, per ridoj, ŝercoj kaj amikeco, milojn da nun vivantaj esperantistoj; verkis niajn plej altnivelajn originalajn romanojn, bonegajn novelojn, poemojn kiujn lernantoj jam povas kompreni kaj tamen kiuj kortuŝas la plej spertajn; li ĵus donis al ni nian plej bonan originalan dramon; lia personeco, elstare aminda, karitatoplena, inspiris milojn . . . Kolomano Kalocsay estas la verkisto, kiu vere levis nian literaturon el la ĉarma sed malalta florbedo de bonintenca diletantismo al la aglaj altecoj de originala genio kaj profesieca tekniko; lia traduklaboro preskaŭ timigas per kvanto kaj kvalito; liaj originalaj poemoj estas la ĝisnuna pinto de nia poezio, kaj pli-malpli ekzemplis por ĉiuj sekvintaj poetoj; liaj studoj pri nia lingvo estas inter la plej valoraj. Oni povus aserti, ke Baghy estas la etika, psikologia filo de nia majstro, Zamenhof; kaj ke lia arta frato Kalocsay estas la krea filo de nia majstro — filo, kiu montris la riĉajn eblojn de tiu belega lingvo, de la patro kreita kaj provadita.

Pro tiuj du artherooj, kaj pro la brila konstelacio de iliaj artaj kolegoj, Budapeŝto estas kvazaŭ pilgrimejo por seriozaj Esperantistoj. Sed pilgrimejo malfacile vizitebla; kaj mi ne kuraĝis esperi, ke mi mem vizitos ĝin.

Kiam en marto ĉi-jare, mi ekvojaĝis al Budapeŝto, kun longe atendita individua vizo, kun invito de la Hungarlanda Esperanto — Konsilantaro prelegvojaĝi en la lando, mi apenaŭ kapablis kredi pri mia propra situacio. Tion ĉi, mi pensis, mi neniam povos meriti . . .

Sed ĉio ĉi okazis. Mi vere prelegvojaĝis en Hungarujon: en Balatonlelle, Budapeŝto, Szeged, Hódmezővásárhely, Oroszhatza, Gyula; mi vizitis lernejojn, kooperativajn bienojn, sanatoriojn, fabrikejojn;

eminentaj hungaroj intervjuis min en oficialaj ejoj. Mi multon aŭdis pri la longaj suferoj de la hungara popolo, tiel malfeliĉe lokita sur la vojo de migradoj, invadoj, militoj, en ilia bela, tragika lando ĉe historia vojkruciĝo. Mi vidis propraokule la kuraĝon kaj esperemon de tiu aminda popolo: Budapeŝto estas jam preskaŭ tute rekonstruita post 1956; oni konstruas ĉie; videble la popolo intencas krei pli feliĉan landon; kaj ĝi sopiras al paco, kiel eble nur popolo tiel ofte invadita, sklavigita, torturita, povas sopiri: tiu “ni volas pacon” ne estas kava slogano; ĝi pulsas en ilia sango. Mi vidis, ke ili jam havas kelkajn imponajn sanservojn, kaj kiel edukado kaj terkultivado progresas. Kaj estas preskaŭ neeble, viziti Hungarujon sen ekami la hungaran popolon: tiel heroe kuraĝan, tiel pacaman, tiel obstine kaj nevenkeble espereman, tiel konstrueman, tiel kultursoifan — kaj al fremda vizitanto tiel nemeriteble serveman kaj ĝentilan.

Sed mi nun volas iom bildigi al la leganto niajn du plej karajn kaj eminentajn verkistojn, kiel personojn.

Hejmo de Kalocsay: altplafona apartamento, belstilaj mebloj, monumenta skribotablo, eble la plej granda kiun mi iam ajn vidis; papero, papero, papero; libroj, libroj kaj pli da libroj. Lia esperanta biblioteko estas vere enviinda; li ankaŭ havas riĉan kolekton de alilingvaj libroj kaj precipe de hungara literaturo. Lia scio pri literaturo, eĉ lia erudicio pri literaturo, estas mondskala. Giganta intelekto, neelĉerpebla art-amo.



—foto de M. Boulton

Kalocsay kaj Baghy amike argumentas en la hejmo de Kalocsay —Aprilo, 1959.

Oni facile forgesus, en tiu ĉi librotape-
tita ĉambro, ke nia poeto Kalocsay estas
ankaŭ eminenta hungara kuracisto: ĉef-
kuracisto en grava hospitalo, li estas alte
estimata en sia profesio; li verkis multajn
sciencajn artikolojn. Eĉ mi povas fanfa-
roni, ke iam mi mem iĝis pacientino de
mia arta majstro: mi havis nazkataron
kiam mi por la unua fojo vizitis lin, kaj li
donis al mi pilolojn.

Paperoj: trezoraro! Dum la lastaj jaroj
Kalocsay multe suferis pro diversaj mal-
sanoj; kaj juna li ne plu estas; sed antaŭ
nelonge li finis grandiozan laboron pri tra-
dukoj el Heine. Kia estas lia nuna labor-
programo? Li laboras super senspirige
granda projekto: kvinvoluma antologio el
la monda literaturo! Mi sidis en la impona
ĉambro: cezaraspekta, belvoĉa, Kalocsay
laŭtlegis al mi tradukojn el la latina. Lia
projekto ŝajnas al mi neplenumebla; sed
se oni havas lian potencon intelekton kaj
lian laborkapablon, kion oni ne povas fari?

La poeto aspektas iom kiel oni atendas
ke geniuloj aspektu. Altan frunton li ha-
vas; buŝon fortan sed senteman; tre pene-
trajn okulojn; li estas alta kaj bela viro;
lia voĉo profunde vibrigas la kordojn de la
animo; kaj li montras ian larĝan majestan
ĝentilecon kiu preskaŭ timigus, se li ne
estus samtempe tiel varmkore ĉarma, sim-
patia kaj ofte ridetanta.

Li kaj lia edzino estas tre gastamaj; mi
manĝis ĉe li, kaj ĉio estis bonega, kvan-
kam mi tiel streĉe kaj emocioplene atentis
mian majstron ke mi preskaŭ ne kapablis
manĝi. Li donacis al mi belan fotolibron,
pri bestoj kun siaj idoj — libron de hun-
gara fotoartisto; kaj tie mi trovis belegan
leonon kun tre malgranda, hezitema leo-
nido. "Jen," mi diris, "jen Kalocsay . . .
kaj mi." Ni ĉiuj ridetis.

Al sia arto li vere estas dediĉita. Li pa-
rolas pri iu malgranda detala tradukproble-
mo; pri iu nova metriko kiun li volas uzi
por doni ĝustan ekvivalenton de latina

metriko; pri konfliktaĵaj mitoj kaj kiel oni interpacigu ilin kompromise; pri bildo, kiu klarigas punkton en antikva poemo; ĉiam oni vidas la seriozecon de vere granda artisto.

Kaj ankaŭ tiu geniulo povas esti amuza. Kiel amuza li kelkfoje povas esti! Spritaj aludoj, ridigaj anekdotoj, etaj mimikaĵoj, rapidaj rebatoj al ŝercoj de aliaj . . . oni povas esti tre gaja apud Kalocsay.

Sur tramo en Budapeŝto mi estis la ŝinco en sandviĉo inter Kalocsay kaj Baghy. . . . "Nun ni descendos, Marjorie."

"Ni NE descendos!" Akra alta voĉo de maljuna aktoro. "Ni deiĝos!" Tiuj du granduloj daŭre batalas pri vortoj . . . sed tre amike, eĉ frate.

Kia estas Julio Baghy? Unuvorte, aminda. Kial aminda? Ĉar li difuzas amon ĉien.

Li akompanis min dum mia prelegvojaĝo, ĉiam helpema, simpatia, servema, afabla, kvankam lia sanstato estis tiam malbona kaj la taskoj pri mi terure lacigis lin. Mi ekmalŝanis: li flegis min tiel dolĉe, amike, kompreneme, ke unu tagon mi eklarmis pro pura dankemo kaj neindecoŝento . . . Sur trajnoj ni manĝis panon kun kolbasoj; en diversaj urboj ni manĝis kiel honorgastoj . . . kaj ni tiom devis trinki likvorojn kiel honorgastoj, ke kelkfoje nur mia volforto staris inter mi kaj ebrieco. Mi plidikiĝis pro hungara gastamo, sed Baghy ne; lia maldikeco havas preskaŭ mitologian kvaliton.

Li ĵus verkis folkloran poemon — rakonton — kun tre malfacila rimskemo kaj metriko; multon el ĝi li deklamis al mi. Lia voĉo estas stranga kaj akra, pro liaj multaj suferoj, precipe kiel militkaptito en Siberio; sed ĝi neniam tedis aŭ ĝenis min; mi volonte aŭskultis lin dum horoj, ĉar li ĉiam diris ion inspiran, aŭ pensigan, aŭ korkareseman, aŭ konsolan, aŭ eble amuzan. Dum unu minuto la tuta li vibras kaj

vervas en pipra anekdoto; dum dua minuto, li vokas larmojn al la okuloj per kortuŝa historio pri io, kion li vidis dum sia eventoplena vivo.

Li estas tre karesema: ĉiam li salutas siajn geamikojn per viglaj manopremoj, serpentaj ĉirkaŭbrakoj, multaj kisoj pli bruaj ol brulaj. Mi admiras tiun ĉarman kutimon, kaj agas same se mi povus venki miajn inhibiciojn. Baghy gestas konstante dum li parolas, grimacas tre esprime, mimikas . . . kaj karezas la alparolaton. Liaj karesoj esprimas lian konstantan simpatian, lian varmkorecon. Ĉu aminda infano? ĉu mistera grandaĝa saĝulo? — Oni ne povas decidi; sed nia Baghy estas unika kaj multloke adorata kor-filatelisto.

Li tute ne postulas intimecon: li neniam faris al mi ian ajn personan demandon, kvankam mi preskaŭ tuj sentis, ke mi povas al li konfidi ion ajn; sed li donas sin mem senrezerve, kun neordinara sincereco.

Pri verkado: Baghy kutime pensas pri komencantoj kaj tre simplaj esperantistoj; li uzas simplan stilon — sed tre trafan; li intence uzas relative malgrandan vortaron — sed tre delikate kaj lerte. Li estus multe pli verkinta, se li estus en la vivo ĝuinta pli da komforto, sano, privateco. Fakte lia granda verkado estas preskaŭ miraklo, se ni pripensas la malfacilan, preskaŭ vagabondan vivon de multaj jaroj, militojn, malsanojn, konstantan malriĉecon.

Hejmo de Baghy: malgranda, malriĉa apartamento; mi volus loĝigi tiun maljunan anĝelon, lian loĝalan bravan edzinon kaj lian simpatian filon en malgranda eleganta palaco kun ĉio bona. Li ne vivas komforte. Tamen, li havas multajn librojn; kaj amo lumigas la hejmeton: amo al familianoj, al geamikoj, al patrujo kaj al la tuta homaro. Parenteze, la fianĉino de lia filo estas tiel bela, ke mi demandis

al mi, ĉu amanta patro kreis ŝin el la propra belamanta fantazio?

Jen malgranda, tre maladekvata skizo, pri du inter la plej grandaj homoj de nia Movado, du homoj noblakraj, artdediĉitaj kaj heroe persistemaj. Mia vizito al Budapeŝto estis inter la plej grandaj privilegioj de mia vivo. Kaj antaŭ tiaj homoj, oni devas ja demandi al si: "Ĉu mi faris mian eblon por la Movado?"

Ĉu oni iam ajn faris vere sian eblon por la Movado?

Se iu faris, eble tiuj du en Budapeŝto.

—*Marjorie Boulton*

Helpu!

Materialoj por ekspozicio de la Ligo de Esperantistaj Foto-Filmamatoroj estas bezonataj de S-ano Arpad G. Poloskey, Puskas Ter. 13, Budapeŝto XI, Hungario. Leterojn, poŝtkartojn, ktp.



Deak & Co., Inc.

Foreign Exchange
International Travel
550 South Hill Street
Los Angeles 13, California
Dirk Brink, Branch Manager

Kiamaniere ŝpari monon je viaj vojaĝoj
per aeroplano alilanden?

Estas ne malfacile, se vi tuj skribos al
ni por senpaga flugfolio:
DEAKONOMY TRAVEL



The Answer To the Problem of a SHRINKING WORLD

☆☆☆ a real MUST for every
Esperantist and every Esperanto
Club—a full supply of the
new pamphlet:

The World Is Getting Smaller and Smaller



for distribution to your friends . . .
enclose them in your letters . . .
pass them out at classes . . .

a conversation-piece
about conversation

Has space for address of local group,
book dealer or individual distributor.

100 for \$1.50
1000 for \$12.00

**ESPERANTO - HILLSBORO,
OREGON**

ŜACI



Jen la bildo de tre neordinara hundino.

Ŝia nomo estas “Ŝaci”, kiu germane signifas “trezoro”. Ŝi loĝas en Esperantujo kun la familio Doneis, kiu dum la somero ferias inter la belaj arbaroj de norda Wisconsin.

Tie ŝi estas tre feliĉa, ĉar ŝi povas ludi per sia plej ŝatata trezoro — roketoj. Trovinte unu kiu ĝuste konformas je ŝia buŝeto, aŭ — kiel kelkfoje okazas — tute ne konformas je la buŝeto (la ĉefa afero estas ke ĝi estu ŝtono), ŝi portas ĝin al la plej proksima homo. Ne gravas ĉu li estas okupata aŭ ne ludema — eĉ ĉu li batalas danĝeran arbar-fajron — Ŝaci postulas atenton per rapidaj bojetoj, per petantaj brunaj okuloj, kaj per sku-saltoj kiel infano. Kion ŝi postulas? Ne multe — nur ke oni forĵetu ŝian roketon. Kompreneble, oni ne povas

rifuzi ŝin (kiel oni ne povas rifuzi iun alian knabinon). Tuj post la forĵeto ŝi preskaŭ flugas tra la folioj de la arbar-planko (se io tiel malalta povas flugi), ofte en la mala direkto de sia ŝtoneto.

Sed ne ridu — ŝi nur ŝercas, kaj baldaŭ cirklas ĝis ŝi atingas la ŝtoneton. Tamen, se ĝi falas en la malprofundan akvon de lago, ŝi devas barakti kontraŭ speciala problemo, ĉar ŝi ne povas toleri ke akvo tuŝi la delikatajn orelojn. Tial, ŝi hezitante proksimiĝas al la ŝtoneto, la kapo zorge kaj kvazaŭ fiere levita super la akvo, kaj gracie etendas unu piedon, per kiu ŝi tiras la roketon tra la akvo ĝis ŝi povas pli ĝentile havigi ĝin.

Kiam la amato ŝtoneto estas sekure en la buŝo, ĉu ŝi tuj portas ĝin al la plej apuda persono, kaj rekomencas la ludon? Tute ne. Anstataŭe, ŝi dorlotas ĝin per piedoj kaj nazo, ŝi ame lekas ĝin, kaj ŝi petole ŝovas ĝin per nazon laŭ la teron, kelkfoje ŝajnigante ke ĝi estas perdita. Nur post tia ludado, ŝi buŝe reportas ĝin al homo.

Se oni forĵetas ŝian ŝtonon nur malgrandan distancon, ŝi ofte intence preterkuras ĝin kaj poste revenas; alie la ludado estus tro mallonga.

Ŝi estas ankoraŭ juna (nur du jarojn) kaj eble tial ĝuas ludi. Tamen, ŝi ankaŭ de tempo al tempo postkuras sciurojn, kaj kiam ili grimpas arbon, ŝi penegas sekvi ilin kaj ŝajne ne komprenas kial ŝi ne povas tion fari.

Kiel ŝi havigas tiel multe da energio kaj ludemeco? Sendube de ŝia mirega dieto. Ekzemple, ŝi entuziasme trinkas “coca-cola”. Kaj ĉu vi povas diveni kion ŝi manĝas tiel volonte en la supra bildo? Jes — raz-sapon! Sed ne la ordinara speco — ĝi devas enhavi barb-pecojn.

Ĉu vi iam konis tian hundinon?

S-ino Doroteo Holland

Lernu per Ludo

Mi elpensis Esperantan ludon, laŭ nomo ĜUSTA - MALĜUSTA. Ĉiuj grupoj rajtas uzi ĝin. Ĝi pruvigos esti tre amuza kaj instrua. Oni ĝin ludas jene:

Havigu sufiĉe grandnombron da kartoj, ĉirkaŭ tiel grandaj kiel bankedaj biletoj. Unuflanke sur ĉiu skribu, aŭ presu, demandon Esperante. Ĉirkaŭ duono de la demandoj estu gramatike ĝustaj; la alia duono enhavu po unu aŭ plu erarojn. Ekzemple — Kiel oni devus konduti en la preĝejo? (Ĝusta). Kio faris Vilhelmo Ŝakspir? (Malĝusta).

La anoj de la grupo povas ludi indvidue, aŭ la grupo povas dividiĝi en duonaj grupoj por kontraŭe ludi. Se la partoprenantoj ne estas lertaj Esperantistoj, estas konsilinde havi lertan gvidanton.

Oni donu al ĉiu partoprenanto kvin— aŭ plu, laŭ elekto—kartojn. La frontoj de la kartoj kuŝu malsupre sur la tablo. La cetero de la kartoj restu en staplo sur la tablo. La unua ludanto prenas unu el siaj kartoj kaj laŭtlegas la demandon. Se la leginto de la demando trovas ĝin malkorekta li tuj diru, “Malĝusta”, korekti la demandon kaj ĝuste respondu al ĝi. Se li ne faras eraron li metu la karton kun siajn responditajn kartojn kaj prenu alian karton el la staplo.

Se li opinias ke la demando estas gramatike senerara li tuj respondas la demandon per plena frazo. Se li pravas, li metas la karton sur la tablon apud siaj aliaj kartoj kaj prenas alian karton el la staplo.

Se la ĵusa respondinto faras eraron, aŭ laŭ korekteco de la demando, aŭ en sia respondo, iu alia ludanto ekdiras, “Malĝusta!” kaj ĝustigas la eraron kaj ĝuste respondas. Se la dua faras eraron alia same alvokas lin k. t. p. ĝis iu faras ĝustan ludon. Ĉiu, kiu faris eraron, donas al la lasta unu karton. Ĉi tiu metas la respondi-

tan karton sur la tablon kaj restigas la aliajn kun siajn kartojn.

La ludado daŭras ĝis la staplo da rezervitaj kartoj estas elĉerpita. La persono, aŭ grupo, havanta la plej grandan nombron da kartoj venkas.

—George E. Wagner

Introduction to
ESPERANTO
THE UNIVERSAL LANGUAGE
The Third Edition . . . REVISED . . . Price \$2.00
Sent on Five Days FREE Examination!
BOX 792 • PLACERVILLE, CALIF.

Learn

ESPERANTO

by Correspondence

ESPERANTO-by-MAIL

123 East 35 Street Brooklyn 3, N. Y.

☆☆☆☆☆☆*****

"SAY IT IN ESPERANTO"

**An Exceptionally well written,
well printed and well bound
pocket phrase-book.**



*An Ideal "Bonvojaĝa" Gift for
Friends Travelling Abroad*

75¢ per copy



ESPERANTO LEAGUE
BOOK SERVICE
Middleton, Wisconsin

Lord Dowdling on a Common Language

ACCORDING to Hansard, British equivalent of our Congressional Record, of July 22, 1959, reporting on the debate on the United Nations and world authority, the British Air Chief Marshal said:

“In the meantime, what can be done to bring the nations closer together? It is the curse of Babel which stands in the way. In his imaginative masterpiece *With the Night Mail*, Kipling created an aerial board of control with the motto “Transportation is Civilization”. This is a truth, but only a half-truth. Communications involve mental contacts as well as physical transportation. A Londoner can today go to China in less time than it would have taken him to go to Edinburg 200 years ago, but when he gets there he is a stranger among strangers. He is a “foreign devil” whose contacts must be made through interpreters. He cannot realize the atmosphere of Chinese life, nor can he convey to them anything of his own mentality. It is, in fact, easier for the British to maintain mental contact with New Zealand than with France.

“Therefore it seems to me that an essential step in making contact between nations and the enlargement of the political unit must be the creation of a common language in some shape or form. For some obscure reason, advocates of a universal language are generally labelled as cranks. Why this should be I do not know. What is fantastic or unpractical in the suggestion that every nation should retain its own language, teach it in its schools, and teach one other language, that one to be the same everywhere? Some nations teach three or four languages in their schools as a matter of course. The idea is simple enough in essence; the difficulty lies in persuading all nations to accept the same language. This choice is essentially a poli-

tical one. I can well believe that national pride and national prejudice might prevent the acceptance of any existing language if it were a widely spoken language. But it has been suggested that some dead language might be revived, with an artificial extension of its vocabulary to meet modern needs. Perhaps the most promising suggestion is that Esperanto should be the choice. This language has been making steady progress without any official assistance, and is perhaps ripe for general adoption.

“As I say, it is idle to discuss this question in abstract. It all depends on what the nations can be persuaded to accept, and that is essentially a political question. But, quite apart from its value in bringing the nations together in amity, nobody can deny the advantage of a common language to the traveller, the scientist and the trader. Anyone who has had anything to do with an international conference would bless the day when a common language was adopted, and the United Nations Organization itself would find its deliberations immensely simplified. Not the least grateful, perhaps, would be the Commander-in-Chief of the International Police Force for this help in the control of his heterogeneous constabulary. So, whatever recommendations may be made to the United Nations Organization by Her Majesty’s Government as a result of this debate, I venture to hope that the claim of a common language to a high priority may not be overlooked.”

Esperanto in North America

SEATTLE, Wash. — A beginners' class in Esperanto started Sept. 23 at the Seattle YWCA. The instructor is F. R. Carlson, and the textbook used is Mr. Carlson's 10-lesson "Seattle Esperanto Book".

On Sept. 9, local Esperantists were hosts to Dr. Tukasa Kobayasi, Research Fellow of the University of Tokyo, who is in the U. S. as a Research Scholar under the Fulbright program. Members of Mrs. Higbee's advanced class had their first opportunity to meet a foreign Esperantist and learn first-hand how much more easily such a traveler can use Esperanto in a foreign country than the language of that country. Dr. Kobayasi studied the King's English for many years, then came here and found that we speak the President's English, which he could not understand.

BURLINGAME, Cal. — The high school group at the Burlingame First Methodist church invited the local Esperanto group to tell them about Esperanto. Mr. and Mrs. William Schultze told the group all about Esperanto and the world's need for an international language. Robert Schaffer, 12 year old member of the Esperanto Youth Class, who had started learning Esperanto less than five months earlier but had been carrying on a lively international correspondence for three of those months, displayed and talked about his correspondence: coins and stamps from Russia, picture postcards from many countries, Esperanto periodicals, etc.

OAKVILLE, Ont. — *Esperanto-Domo* (House of Esperanto) was formally opened on the 18th of July. The *Toronto Daily Star* published a long article about the affair, and later Mr. and Mrs. Eichholz, who

established *Esperanto-Domo*, were interviewed on TV. Their 4 year old son, Alko, appeared with them on the TV program, telling in Esperanto a picture-book story.

UNIVERSITY CITY, Mo. — 17 students finished a six week summer course in Esperanto at the Senior High School. The course was unofficial, but was held during school hours in a class room set aside for them by the school authorities. The textbook used was "Junul-Kurso" (Youth Course). The instructor was George Falgier.

This course was so successful that a correspondence course based on "Junul-Kurso" is being prepared. The course will be free to teachers and students in U. S. schools. For information, write to:

U.S. ILEI, 3622 North Market St.,
St. Louis 13, Missouri.

GREENFIELD, Mass. — David Garson and Warren Gould had a display of Esperanto books and magazines in the Greenfield public library during the entire months of August and September.

At the Franklin County Fair September 5th to 9th Greenfield Esperantists had an exhibit where an estimated 50,000 people had a chance to learn about Esperanto. Sixty-eight filled out questionnaires to show interest in joining a study group, and a meeting is being called October first to organize the new recruits.

Esperanto displays for public libraries in cities near Greenfield have been scheduled as follows: Brattleboro, Sept. 25; Keene, Oct. 2; Athol, Oct. 9.

In addition, librarians in Amherst, Holyoke, Northampton and Springfield (with
(Continued on page 12)

Plu pri Strangaj Lingvoj

La artikolo "Mia Dua Lingvo" en la aŭgusta numero, vekis iom da intereso. Jen unu respondo:

Kara S-ro Carlson:

Responde al la artikolo "Mia dua lingvo" de Adrian Hughes en la Julia-Aŭgusta Revuo kaj lia deziro scii ĉu estas io simila al "pig-latin" en aliaj lingvoj krom la angla mi deziras diri ke en mia juneco en Francujo mi sciis pri du tiaj lingvaĵoj en franca lingvo.

Unu estis nomita "Le Javanais" kaj ĝi konsistis en enmetado de la silabo "av" en ĉiu vorto, ekz. "Mon chapeau" fariĝis "Mavon chavapeau".

La dua estis nomita "Argot de boucher" (Buĉista ĵargono) pro tio ke buĉistoj uzis ĝin por sekrete paroli inter si antaŭ siaj klientoj.

En ĝi la konsonantoj kiuj komencis vortojn estis anstataŭitaj per la litero "L" kaj la deprenitaj konsonantoj estis metitaj je la fino de la vortoj kune kun laŭplaĉe elektitaj finaĵoj, ekz. "Bonjour, monsieur, voici le gigot," fariĝis "Lonjourbem, lon-sieurmik, loicivek le ligotgess."*

Mi konis viron, buĉisto, kiu asertis flue paroli en tiu ĵargono.

tre samideane via,

—Charles Chomette

*Fonetike skribita tiu frazo,

"Larlepem luvik largoĵes de luŝebem?" simple signifas "ĉu vi parolas la buĉistan ĵargonon?" kiu estas, kompreneble en franca lingvo, "Parlez vous l'argot de boucher?"

Esperanto books are available from
**Around the World
Circulating Library**
1264 Gamble Ave., Escondido, Calif.

SEKRETAJ KODOJ

Oni povas krei sekretan kodon per diversaj lingvoj. Jen estas ekzemploj Esperant-lingve. La unua linio estas la ordinara alfabeto, la dua estas la kodo.

UNUA KODO:

ABCĈDEFGĜĤĤ I J Ĵ KLMNO PRSŜ
ZVŬUTŜSRPONMLKĴ Ĵ I ĤĤĜGFE
TUŬVZ
DĈCBA

JZ BŜGTZ FDŜJH VGMJZF

DUA KODO:

ABCĈDEFGĜĤĤ IJĴKLMN O PRSŜT
1 A 9 ZEH 5NT 8 V6OC2S B KMR 4 3PU
UŬVZ
F 7 DL

B6 P1U13 A1K1KMOK

TRIA KODO:

La trian kodon oni kreas per la unua kaj dua. Neatentu pri vortoj aŭ frazoj, sed traktu intersekve je literoj de komunikaĵo tradukota aŭ tradukita. Neparajn numerigajn literojn oni elektas el la unua kodo; parajn numerigajn literojn oni elektas el la dua kodo.

Ĵ6ŜHFUZ3Ĉ3HKH?

Do, oni povas inventi tri aŭ kvar kodojn, intermiksi, malantaŭenigi la literojn, tre komplikite. Sed mi avertas vin duakode:

HD6UF 2MK5FLMK!

ENIGMO NUR POR ESPERANTISTOJ

Ĝmetunu ne nodnalei sinevla notezag. Sitse al Akiremadron Otnarepse-Ouver. Enej unu okirbur: "Omgine run rop Jot-sitnarepse". Jasrevid jonaedimas sigel, etsop sigimgine al nopak. Des orp al olaik, ek iv sagnita al nomok natnavkes, oretsim en eulp satsizke. Sib la al otnavlos! Sib la Otnarepse!

—Maliganto

ELNA's Traveling Exhibit

The forerunner of the present exhibit was one displayed at the St. Louis Central Public Library in 1943. Some of the materials collected then are still valid and are found in the current exhibit. The title, "70 Years of Esperanto," allows any *significant* item old or new, to be used. S-roj Dormont and Baff have contributed interesting items.

The exhibit consists of two parts: mounted materials (circulars, posters, photos, periodicals, pamphlets); and unmounted materials, chiefly books. There are 78 cards 14x22 inches and 10 larger mounts. Two series of Unesco posters are included, comprising 28 striking photos with Esperanto text and English translation. These in themselves make an impressive display.

The book section of the exhibit needs to be improved. Twenty of the books displayed in St. Louis in 1958 were privately owned and were donated to the public library after the exhibit. The remaining books do not adequately represent Esperanto's achievement in book publication. It would cost at least fifty dollars for an adequate display, including Zamenhof's works, a fine edition of the whole Bible, several anthologies, dictionaries, textbooks and other significant books.

ELNA pays the cost of transporting the exhibit one way, the user paying return charges, usually not over ten dollars. We hope to arrange a schedule so that one user ships to the next, thus reducing ELNA's expenditure considerably.

Past showings of the exhibit are listed below for the record, as well as the current schedule. In the future, only the latter will be published.

November, 1943: St. Louis Public Library.
May, 1958: St. Louis Public Library.

December, 1958: Hadley Technical High School, St. Louis. (Partial)

December, 1958: High School, Wellston, Missouri. (Partial)

January, 1959: Pharr, Tex. (A. F. Doneis)

April, 1959: Senior High School, University City, Missouri. (Partial)

July, 1959: ELNA Congress, St. Louis.

August, 1959: World Confederation of Organizations of the Teaching Profession (WCOPT), Washington, D.C. (Only the Unesco posters.)

September, 1959: Greenfield, Mass. (David Garson)

October, 1959: Meadville, Pa. (C. Fisher)

Some institutions not interested in an Esperanto exhibit as such will accept the Unesco posters for display. A second set of these is being mounted for use in such situations.



AS WE GO
TO PRESS

Notice has just been received that some of the Exhibit material has been lost in transit. Please be patient if schedules of display are disrupted while the express agency traces it.

The July, 1959, issue of *Usona Skolta Revuo* carried an interesting explanation in Esperanto of the latest "mouth-to-mouth" method of reviving victims of fumes, smoke and drowning.

KVAKERA ESPERANTISTA SOCIETO

Informojn pri KES kaj kvakerismo
ĉe: **Donald Broadribb, Collins, N. Y.**

Esperanto in N. America (cont. from p. 9)

seven branch libraries) have promised to welcome exhibits with the dates still to be arranged.



SACRAMENTO, Calif. — Members of the Sacramento Esperanto Club took over the UN booth at the California State Fair for one day, and distributed publicity leaflets. The Governor and his wife were among those who visited the booth and expressed interest in our movement.

The Sacramento Translators' Committee for the Olympic Games which will be held near Sacramento in February, 1960, put this in the instruction sheet issued to members:

"Your particular function is to serve as interpreter and host to foreigners within our city. You are one of a group of over 150 volunteer interpreters representing the languages spoken by 34 countries, as well as Esperanto."

A new class of 25 students opened on September 25, under Mrs. Frasquita Overmire.

Ike Sez to Khrushchev:

"Because of our strength, because of our importance in the world, it is vital that we understand each other better. You and I have agreed on that point."

JUST PLAIN



Learn Esperanto, boys!

Esperanto in the American Press

